6-a JARO, N-o 307 LEIPZIG, 21. / 8. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

EL LONDONO

Finiĝis la X-a, "jubilea" Kongreso de SAT. Forpasis la antaŭvidita ŝtormo. Kaj ne frakasiĝis la ŝipeto. Sed estas evidente, ke la danĝero estis pli minaca ol iam ajn antaŭe. Kial kaŝi la veron? Struta politiko neniam montriĝis saĝa. Dum la debatoj aŭdiĝis kelkfoje la vorto "skismo" kiel grava danĝero pendanta en la aero...

Estas evidente, ke la disiĝema malsano, kiu regas en la laborista movado k ĝin malfortigas, ankaŭ iom infektis nian organizon. Estas tre signifa la fakto, ke, la unuan fojon en la historio de SAT, ne estis trovata ia kompromiso, kiu akordigus ĉiujn en fina rezolucio. Almenaŭ okazis tre zorge aranĝita balotado pri akcepto aŭ malakcepto de l' raportaro de la Plenum-Komitato. Nun ekzistas difinita plimulto k malplimulto. Ĉi tiun lastan konsistigas plejparte elementoj erarigitaj de sistema k bone aranĝita agitado per rimedoj kutime uzataj en politikaj partioj.

La opoziciularo havas fakte nenian firman grundon sub la piedoj. Ĝi pafadis al ni per senkuglaj pafaĵoj. Neniu tia pafo povis vundi nin. Oni ja ne povas fari el nenio mortigan pafaĵon. Niaj opoziciaj K-doj devis elpensi pretekstojn por ataki nian gvidadon, ĉar mankas realaj motivoj.

Estas bone konate, ke senkugla sed bruega pafado povas tamen efiki sur neharditajn homojn. Same la senĉesa k aplomba ripetado de malveraĵoj povas ankaŭ konfuzi la cerbon de homoj ne sufiĉe informitaj pri la tuta afero aŭ supraĵe pensantaj.



10-a Kongreso de SAT:
La Kongresanaro antaŭ la Nelson-kolono sur Trafalgar-Placo, Londono

Ni devas gratuli al la opoziciularo, ke teknike ĝi bone organizis sian atakadon. Ĉi tiu lasta estis zorge preparita dum la tuta jaro per cirkuleroj k. a. "Kunligiloj", per sendo de raportoj legotaj ĉe la Kongreso k alvenantaj laŭ ia stranga, neregula vojo, per sendo de telegramo el Moskvo k alvenanta ĉe decida momento kun la celo forte impresi la kongresantojn[1].

Kiam la prezidanto de la kunsido, K-do Sulski, anoncis, ke ĵus alvenis telegramo el Moskvo, granda parto el la ĉeestantaro ekĝojis, kredante, ke niaj tieaj K-doj finfine atingis, ke la Soveta Registaro permesas nun la transsendon de la 14 000 markoj apartenantaj al SAT k troviĝantaj en la kaso de SEU. Forte batis la koroj, ardis pro scivolo la okuloj, ĉies atento estis streĉegata. La prezidanto legis. Konsterniĝo! . . . Malmultaj komprenis la veran signifon de tiu telegramo. Ombro etendiĝis k vualis la esperojn estigitajn de la anonco pri telegramo el Moskvo. Oni daŭrigis la debatojn sen ia komento al tiu stranga dokumento . . .

Ĉe la fino de l' kunsido kelkaj K-doj kopiis la telegramon por povi pli bone prijuĝi ĝian veran signifon. Al komprenkapablaj homoj fariĝis evidente, ke ĝi estis nur aranĝita artifiko por doni la lastan mortbaton al la Estraro de SAT. Esence la telegramo ja diras forpelu la Direkcion k poste ĉio glate iros. Se tion vi faros, ni invitos vin kongresi ĉe Moskvo en 1931.

Malgraŭ ĉiaj tiaj artifikoj, malgraŭ tio, ke la defendo ne estis tiom bone preparita kiel la atako, du trionoj el la voĉoj aprobis la prezentitajn raportojn k deklaris sian fidon al la Direkcio de SAT. Estas evidente, ke tia rezulto

---

[1] Ne volante streĉi la scivolon de niaj legantoj ĝis la apero de l' protokolaro, ni tuj konigas sen ia ŝanĝo la enhavon de tiu tre signifa dokumento:

"Moscou Y M 23 93 W 4 13 0

"SAT Esperanto Kongres Conway Hall Red Lion Square Holborn London W C 1

"Lastjare nuna Direkcio kaj Sennaciulo faris chion por malhelpi SAT kaj ankaŭ SEU agadon. Nuna Direkcio kondukas SAT al rapida skismo. Proteste agojn de Direkcio CK SEU decidis ne utila sian cheeston en London[1]. Alilandaj kongresanoj decidu mem pri situacio. Ni esperas, ke la chikanantoj kaj subfosantoj estos malhelpataj pluen chikani kaj subfosi. Se por la estonta Kongreso estos elektita Moskvo ni faros chion por ke ghi sukcesu. Ni promesas fidelon al nia laborafero CK SEU.

[1] Kontraŭdire al tiu klarigo en raporto pri "La Nova Epoko" de Nekrasov estis dirite, ke "neniu el la nuna Redakcia Komitato de 'LNE' pro la valutaj embarasoj povas alveni Londonon por defendi 'LNE' kun malfermita viziero".

malbone rekompencas la longan k zorgan preparadon de la opoziciularo.

Kelkaj K-doj bedaŭras, ke oni eble ne sufiĉe klopodis por atingi, kiel ĉiujare, ian kompromison, kiu metus vualon sur nian fakte ekzistantan neunuanimecon. La nudan veron mi persone preferas. En la konkludo de nia raportaro ni cetere forte akcentis nian deziron ekkoni tute precize, ĉu jes aŭ ne ni havas la konfidon de la plimulto el la SAT-anoj. Unuanimeco fakte neniam ekzistis en SAT k la voĉdonado konigante tion per ciferoj ne montras ian novan situacion en nia Asocio.

Ni starigis SAT-on kun la celo ebligi al ĉiuj tendencoj el la klasbatala laborista movado, ke ili povu praktike utiligi esperanton k tiel atingi, ke la laboristaj organizoj konvinkiĝu pri la valoro de nia lingvo por faciligi la internaciajn rilatojn. Ni ĉiam celis, ke nia organizo estu kvazaŭ granda hejmo, kie povos kunlabori kamaradece k fratece membroj de diversaj partioj. Neniam ni volis trudi ian ajn politikecan programon al SAT. Tute male ni batalis kontraŭ la provon, kiu estis farata tiucele antaŭ kelkaj jaroj k kiu estis likvidata nur lastan jaron en Leipzig. Neniam ni konsentos, ke SAT fariĝu dogmejo, ŝirmanta ian ajn ortodokson. Tion cetere konsentis la opoziciaj K-doj mem ĉe nia Göteborga Kongreso, kiam ili akceptis *sen ia kontraŭstaro* la tiurilatan klarigan aldonon al la Statuto.

Eklezioj bezonas dogmojn; politikaj partioj bezonas severe difinitan programon; sed SAT ne estas eklezio nek politika partio. Tio estas tute klara k facile komprenebla de ĉiu sincera k mezinteligenta homo. Kiuj klopodis trudi oficialan programon al SAT, tiuj estas la realaj reviziemuloj en nia movado. Sed por kaŝi sian reviziemon, ili kulpigas je tiu "krimo" tiujn, kiuj zorgas konservi SAT-on tia, kia ĝi ĉiam estis ĝis nun.

* * *

Mi volus paroli detale pri kelkaj flankoj de nia ĵus finiĝinta Kongreso. Fariĝas al mi tute klare, ke ni ne ankoraŭ trovis la ĝustan solvon al la problemo pri organizado de niaj ĉiujaraj kunvenegoj. Sed pri tio . . . aliam.

Finante ĉi tiun sendube tro severan raporteton, decas mencii, ke la Londonaj SAT-anoj meritas ĉies dankojn pro la akcepto de la malfacila tasko, kiun ili sukcese plenumis en specialaj kondiĉoj k cirkonstancoj ne tute favoraj. Sed ili certe ne atendas de mi flatajn vortojn; en la flatarto mi estas tre mallerta. Certe sufiĉas al ili la konscio, ke ili plenumis sian SAT-anan devon kiel eble plej bone.

Kiuj ĉefe deziras aŭdi flatajn vortojn, tiuj veturis al Oksfordo. En Londono troviĝis esperantistoj, al kiuj sufiĉas, por fervore batali por nia komuna afero, la konvinko, ke la tutmonda laboristaro nepre bezonas esperanton por labori efike al sia emancipiĝo.

Forpasis nia X-a Kongreso k la SAT-ŝipeto, kiu portas tiom da esperoj, sukcesis ankoraŭ eviti la rifon. Nun la ŝipanaro estu trankvila k sin dediĉu al pozitiva laboro! . . .

8. VIII. 1930. *E. Lanti.*

LA OKAZINTAJOJ EN EGIPTIO

Grandegajn malfacilojn havas lastatempe la brita imperialismo. Ankoraŭ ne ĉesis la bataloj en Hindio sub la gvidado de Gandi kontraŭ la brita administrado; jam el Egiptio atingas nin sciigoj pri revolucio en granda skalo.

Formale la agoj estas direktataj kontraŭ la reĝo *Fuad,* kiu staras kontraŭ la parlamento, en kiu la naciista partio "Vafd" posedas $^4/_5$ el la mandatoj. Ĉi tiu partio postulas restarigon de l' antaŭ nelonge fermita parlamento k, ke je la loko de l' ne per la parlamento elektita ĉefministro *Sidki Paŝa* okupu lokon persono el la "Vafd"-partio.

EN LA LANDO DE L' SFINKSO



Egiptio kontraŭ sia reĝo Fuad

Ekstere oni opinias, ke en Egiptio okazas revolucibatalo inter demokratio k diktatoreco, sed estas aliel: fakte la batalo kontraŭ reĝo Fuad k Sidki Paŝa direktiĝas kontraŭ la angla reĝimo en la lando. Ĉar tiu reĝo estas la vasalo de l' angla imperialismo, fakte staras super la reĝimo de Fuad k S. Paŝa la brita alt-komisaro. La reĝo k lia ministro reprezentas la interesojn de l' egiptaj riĉeguloj, grandmagnatoj k egipta burokrataro. La "Vafd"-partio kontraŭe reprezentas la interesojn de l' mezriĉaj elementoj, kiuj estas kontraŭ la nuna Fuad k la angla sistemo.

En Egiptio estas koncentritaj tre gravaj interesoj de l' angla imperialismo. La lando estas ne nur merkato por angla vareksporto, sed ankaŭ liveranto de kotono por la brita industrio. En tio la *Suec*-kanalo ludas la plej gravan rolon. Ĝi estas por Anglio la ŝlosilo, kiu ebligas al ĝi okupi la diversajn surmarajn vojojn, kiuj kondukas el Eŭropo al Azio, Afriko k Aŭstralio. Tiu kanalo kunigas Anglion kun Hindio, Aŭstralio, Novzelando k Afriko. Se Anglio perdas la Suec-kanalon, estas rompita la mondsuperregado brita. Tial antaŭ k post la mondmilito la celo de l' brita imperialismo estis sendanĝerigi sian regadon ĉirkaŭ la Suec-kanalo. Tio ankaŭ estas la senco de l' okupado al Palestino fare de Anglio, kiu signifas grandan pluson por la defendo de l' kanalo. Jen la politika linio de ĉiuj anglaj registaroj.

La rezulto el antaŭ nelonge okazintaj traktadoj inter la estinta "Vafd"-partia registaro k la brita administrado en Egiptio estis nula, ĉar Anglio ne povas k ne volas perdi sian hegemonion super la Suec-kanalo k Sudano, en kiu lasta estas grandaj anglaj posedaĵoj, kotonplantejoj ktp. La reĝo Fuad k la nuna egipta registaro estas servistoj de Anglio. La burĝa "Vafd"-partio postulas de Anglio grandajn cedojn, k tial la antaŭa "Vafd"-ministraro estis forigita k la parlamento fermita.

La agrarkrizo, kiu furiozas tra la tuta mondo, atingis ankaŭ Egiption k rezultigis katastrofan malbonstaton por la egiptiaj laborist-amasoj pro la prezmalaltiĝo de l' agrarproduktoj. Tiu fakto pliakrigas la karakteron de l' okazintaĵoj: ekagis la socia elemento ĉe la egiptiaj laboristoj, pri kiu timas la burĝa "Vafd"-partio.

En Hindio laŭ diversaj gazetinformoj burĝaj politikistoj preparas intertraktadon kun la angla imperialismo, — la samo okazos en Egiptio: tiuj k aliuj ricevos iomajn cedojn k la afero estos solvita. La batalon por la universala forigo de l' imperialismo povos plenumi nur la tutmonda laboristaro, batalon sen cedoj ĝis plena venko de l' laborista klaso.

Laŭ juda "Arbajter-Cajtung" trad. *Amero*[1].

[1] Kelkaj mallongigoj estas faritaj de la Redakcio.

Aperis ĉe SAT-KOOPERATIVO
la belega fantazia romano
de A. Bogdanov
RUĜA STELO
kolektive el rusa lingvo tradukita sub redakto de N. Nekrasov k S. Rublov.
Formato 12×18 cm. 168 paĝoj.
Prezo: **1.60 mk. g. — Tre leginda libro.**
Mendu tuj ĉe Administracio de SAT Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio

PLIO PRI ĴURNALISMO EN BRITIO

En artikolo sub supra titolo en n-o 302 oni legas: "Ĝis nun *Daily Herald* en sia nova formo ne montris signojn de malforto. Ŝajne nenio ŝanĝiĝis." Kion signifas malforto? Ĉu nur estas afero de nombro da legantoj? Legante la *Ĉiutagan Heroldon* oni preskaŭ pensus, ke oni legas la *Daily Mail*[1], ĉar en ĝi troviĝas la samaj historietoj pri la Princo, la Princineto k la kompatindaj virinoj, kies belaj vestaĵoj estis difektitaj per pluvo ĉe Askot*(Ascott)-ĉevalvetkur*ado. La sola diferenco estas, ke en ĉio en *Daily Herald* subtenas la Laborpartian registaron, sed la *Daily Mail* malestime traktas ĝin, nomante ĝin "Socialista".

Ŝanĝo sendube okazis, sed ĝi okazis tielgrade, ke multaj ne rimarkas ĝin, ĉar ĝi estas afero de jaroj, k la aĉetado de *Odhams* estas nur la lasta malgranda paŝo.

Kion do legas la laboristoj, kiuj laboris por sukcesigi la *Daily Herald* en la unuaj tagoj? Ili plejparte sin turnas al la kompartia ĵurnalo, la *Ĉiutaga Laboristo (Daily Worker)*, kiu aperis unue je 1. januaro 1930. En ĝi oni legas pri okazintaĵoj gravaj al la laboristaro — pri la vera batalo en Hindio k Ĉinio, pri la batalo en la teksindustrio, pri la militpreparoj de la registaroj ĉiulandaj — inkluzive la angla Laborpartia registaro. Pro tio la registaro malamas la ĵurnalon k estas preta aŭskulti la kritikojn de la konservativuloj, kiuj laŭte kriis kontraŭ la *Ĉiutaga Laboristo* de la tago de ĝia unua n-o, kiam ĝi enhavis salutojn de Komintern.

Pro registara malaprobo baldaŭ post ĝia ekiro la pograndaj ĵurnalvendistoj rifuzis vendi ĝin, sed la kompartio organizis la dissendon, do ĝi ankoraŭ disvastiĝas. La plej lasta bato kontraŭ ĝi estas leĝa proceso, gvidata de la ĉefleĝisto de Laborpartia registaro, kontraŭ tri gvidantoj k la kompostisto. Estas kontraŭleĝe skribi malestime pri juĝistoj: tial ke aperis artikolo kritikanta juriston, kiu dekretis 18-monatan malliberigon al laboristo disdoninta kontraŭmilitajn folietojn al soldatoj, la gvidantoj estis kondamnataj al 9 monatoj da malliberiĝo k la kompostisto al monpuno de £ 250. *9896.*

[1] Redakcia ĵurnalo de konservativa tendenco.

INDUSTRIO KAJ MILITO

Mi ja ne plu ŝatas legi primilitajn librojn. Ĉiuj nunaj tiaj libroj ŝajnas al mi malsuperaj je tiuj, kiujn verkis la francoj dum la katastrofo.

Ludoviko Renn, Remark (Remarque) ktp. nur vidas la eksteron de la aĵoj. Laŭŝajne ili ne konas la kernon, tion, kio pleje meritus esti klarigata al la popoloj por spertiĝo. Malfeliĉa la mondo, se nur per literaturo devus foriĝi la militemo!

La kapitalisma industrio uzas en laborilaro grandegajn kapitalojn, kiuj devas doni al ĝi kutiman altan rentumon. Halto, eĉ mallonga, de la maŝinaro alportus al ĝi grandajn perdojn, k tial ĝi estas devigata produkti konstante, senripoze, ne kalkulante la konsumon de la merkato. Kiam oni tro produktis, estas necese malplenigi la stokejojn[1]. Tiam komenciĝas la dramo.

La tuta industrio estas trustigita. La trusto ĉiam nepre gajnas, ĉar ĝi havas kvazaŭ monopolon, kiu permesas al ĝi fiksi siajn prezojn sen ebla konkurenco. Por ke ĝiaj gajnoj ne restu en senmovo, ĝi eluzas ĝin, pligrandigante la maŝinaron, tio estas — la produktadon, k samtempe la malfacilon eldisvendi. Tiel la burĝa industrio preparas nekonscie la modernajn laborkrizojn, kiuj, kiel kolektivaj plagoj, anstataŭas la malnovajn pestojn k malsatojn.

La rezulto de la ekonomiaj krizoj egalvaloras tiun de la revolucioj, ĉar la sekvo de ĉiu revolucio konsistas el translokiĝo de kapitaloj.

La timo je tiu tragedio naskas la imperialisman politikon, kun ĉiuj ĝiaj kruelaĵoj por akiri koloniojn k konkeri merkatojn; tio estas la milito, kiu ekstaras neeviteble dum oni ne haltigos la maŝinojn.

Ĉu iam povos verkiĝi kontraŭmilita libro kapabla haltigi la maŝinojn? En nunaj tagoj laboras senĉese sur nia planedo dekdu milionoj da ĉevalpovoj. La produktata riĉo estas nekalkulebla . . . k tamen regas mizero, ĉar la industria organizado de l' negocoj estas konstanta minaco kontraŭ la libero de la laboro; k estas konstanta timo, ĉar la komerca organizado kondukas nepre al la almilitado por nuligi la fremdan konkurencon aŭ por vendi perforte al tiuj, kiuj propravole ne aĉetas.

Nur efike laboras cele al paco tiuj, kiuj batalas kontraŭ la burĝa organizado de la industrio k komerco. La literaturon oni povus malhavi sen malprofito por la universala paco.

J. Senador en "La Socialista" (Madrido).
Trad. V. M. (13 587).

[1] Tenejoj, deponejoj.

PRI LA "LETERO EL ITALIO"[1]

H. Martz, Crimmitschau

Jam ofte oni povis legi en "S-ulo" alvokojn pri objektiva raportado. Sed ŝajnas, ke malgraŭ tio ĉiam ree aperas raportoj, kiuj enhavas neverojn. Ekzemple en supre citita letero la itala K-do raportas pri salajro, vivproduktoj, vestaĵo k valuto. La tuta raporto estas senvalora, ĉar ĝi entenas 50% da malveroj. La liro ne egalas 0,03 dol. aŭ dek liroj = 1 mk.g. Same ankaŭ la prezoj estas troigitaj. Mi bone povas kompreni, kion per sia raporto volas atingi la itala K-do. Sed li ne forgesu, ke oni ne povas kontraŭbatali ion per neveroj. Mi pensas, ke la faŝismo havas multajn nigrajn flankojn, per kiuj oni povas ataki k kontraŭbatali ĝin. Sed per neveroj oni nur faras propagandon por ĝi. Certe mi per tiuj riproĉoj ne volas esprimi simpation al la faŝismo, tute ne; mi nur skribas tion, ĉar la dirita raporto kompromitis min k nian gazeton ĉe faŝistoj, k.eble ankaŭ aliaj K-doj spertis la samon. Traleginte la citatan leteron, mi tuj komencis ataki la faŝistojn en nia fabriko en ĉeesto de laboristoj, kiuj forte simpatias al la faŝismo. Sed ho ve! la faŝistoj min morale vangofrapis, konvinkante min, ke la raporto en "S-ulo" estas mensoga. Do, anstataŭ kontraŭbatali la faŝismon, mi atingis la malon.

Tial nia gazeto estu k restu ĉiam neŭtrala al la socialistaj partioj k enhavu nur verajn raportojn. Sed tio estas atingebla nur, se ĉiuj SAT-anoj atentas la regulon pri objektivo, ĉar la redaktoro ne povas scii pri ĉiuj aferoj en ĉiuj regionoj de l' tuta mondo. Pli bone silenti ol senkreditigi k kompromiti per neveraj raportoj "S-ulo"n!

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

El Meksikio

Dum la lastaj monatoj ĉia propagandmaterialo estis subpremata de la poŝto, t. e. ĉiu presaĵo, kiu portis ekz. kiel titolon "Al la Laboristoj". Ankaŭ en oficejo de nia grupo estis konfiskata de l' polico la sendita revolucia materialo. El leteroj ricevitaj de Gvatemalo ni scias, ke tie okazas la samo, k ni ne sukcesis konservi la interrilatojn kun la tieaj K-doj. Ree estis malliberigataj 17 kamplaboristoj de l' norda distrikto de Baja Kalifornio, pro revolucia agitado, inter ili K-dino Felipa Velazkez (anarkista propagandistino) kun tuta familio. La 16. junio okazis la Unua Anarkista

[1] Vidu n-on 303, pĝ. 480/81.

Kongreso de Meksikio, en kiu oni traktis demandojn pri anarkista edukado k organizado, kontraŭbatalo al subpremado ktp. (Grupo "Verbo Rojo", Meksiko).

El Ĉinio

En majo kelkaj K-doj estas malliberigitaj pro preparo de unuamaja manifestacio. Inter ili estas K-do Kit Ŝa, kiu redaktas la organon "Working Youth" (Juna Laboristo) k Ŝujin Lian. Ili tre suferas en la malliberejo pro la malbonegaj, precipe en somero, kondiĉoj. La organo "La Proleto", kiun eldonas "Nord-Ĉinia Prol. Junulara Federacio" ne plu povas aperi pro subpremo de la registaro. (Maŭ.)

Junul-anarkistoj punitaj en Germanio

Komence de l' jaro, kiam okazis propagand-renkontiĝo de l' sindikatist-anarkista junularo de l' Rejn-Majndistrikto en Odenvald-arbaro, partoprenantoj interbatiĝis kun la polico ĉe stacidomo Benshajm (*Bensheim*). Konsekvence K-doj H. Mössner el Frankfurt k K. Gültig el Offenbaĥ ricevis punon de 4 k 3 semajnoj da malliberejo pro kontraŭstaro al la ŝtata potenco, arestit-liberigo, incito k ofendo.

Laŭ I. N. O.

MASTROJ DEZIRAS SOCIALISMON

F. S., Vieno (16362)

Strange, ĉu ne? Sed vere. Jen mia pruvo. La agrikulturo en Aŭstrio jam delonge ne kontentige evoluas k la mastrumistoj postulas publikan helpon. Pro tio la registaro preparis leĝprojekton, laŭ kiu la ŝtato impostus grenon, farunon k panon je 15 groŝoj (0.02 dol.) po kilogramo. Se la parlamento akceptus tiun leĝon, ĉiu laborista familio pagus jare dekojn da ŝilingoj pli multe por la plej gravaj nutraĵoj ol ĝis nun. Entute la leĝo direktiĝas kontraŭ la laboristaro, ĉar ekzemple la milionulo Rotŝild ja ne konsumas tiom da pano kiom proleto. Tial la soc. dem. partio akre batalas kontraŭ la leĝiĝo de tiu fia intenco de la burĝaj regantoj.

Krom tio la tuta provo, subteni grandbienulojn helpe de senposeduloj, okulfrape instruas nin, ke ankaŭ kapitalistoj serĉas kvazaŭ socialismajn rimedojn (kvankam netaŭgajn) por superi krizojn, se kapitalismaj rimedoj ne plu sufiĉas. Ankaŭ ili parolas pri devoj de la socio, helpi al malbone statantaj grupoj, se tiuj troviĝas ĉe burĝa flanko k ne temas pri senlaboruloj. Ankaŭ ili havas socian koncepton, sed nur utile por si mem, ne por la laborista klaso. Mizeruloj subtenu riĉulojn — tio estus la "socialisma" bildo de potenculoj. Sed kelkfoje tiuj hipokrituloj mem senmaskigas sin k ni vidas grimacon de egoisma, mastra "socialismo". Ĉiam ili defendas la privatan mastrumadon, sed se grandkamparanoj lamentas pri ŝuldoj, kial ili do ne deklaras, ke tio estas privata afero, kiun la ŝtato ne enmiksiĝu? Tion ili nur scias rilate al sociaj rajtoj de laboristoj. Kaj tiaj fiuloj kuraĝas insulti nian senklasan, la tutan popolon, eĉ la tutan homaron ampleksantan socialismon . . .

Kontrolu vian membrokarton, ĉu vi jam pagis vian kotizon por 1930.

PRO DOSTOJEVSKI

Genia romanisto-psikologo, antaŭulo de Revolucio (1821—1881)

Manko da originaleco ĉiam k ĉie en tuta mondo estis opiniata kiel plej valora kvalito k plej bona rekomendo de vera aferisto k praktikulo. Almenaŭ 99 centonoj da ĉiuj homoj ĉiam konfesis ĉi opinion k nur apenaŭ unu centono da ĉiuj homoj pensis k pensas aliel . . .



Inventistoj k genioj preskaŭ ĉiam en komenco de sia agado (k ofte en la fino) estis opiniataj de la mondo kiel stultuloj. Ĉi rimarko iĝis tute rutineca, ĉar estas tro konata al ĉiuj . . .

Ioma malakreco de saĝo ŝajne estas tute necesa eco de ĉiu serioza monakiranto, se ne ĝenerale de ĉiu aganto . . . El romano "Idioto".

Dostojevski nur konstatis la faktojn liveritajn el abismoj de lia suferinta koro, ne el kapo. Liaj verkoj bildas animan tragedion sekvigatan de la faktoj. Sed kio kaŭzas ilin? Kial geniuloj k inventistoj, — veraj bonfarantoj de homaro, — estas mokataj k pelataj? Kial talentaj agantoj por esti tiaj devas havi vere "ioman malakrecon de saĝo"? La kaŭzo kuŝas en tio, ke la "mondo" mokanta k pelanta fakte ĉiam prezentas du malegalajn antagonistajn partojn, unu el kiuj regas k diktatoras super la alia. La unua estas Nuno reganta, la dua — Novo ĝermanta k tial nefacile rimarkebla. Novo kreskas en Nuno k siatempe krevigas ĝin. Ĝi kreas tragedion de Nuno k samtempe ebriigan ĝojon, entuziasmon de Vivo! Ĉiu aganto povas esti "saĝa" k vera aganto nur se li priservas Nunon kun ĝiaj plene konataj ĉar konkretaj interesoj. Do li ne povas okupi sin pri estonto, kies mastro estos Malnuno. La estonto por li nevole iĝas nekutima, fremda k nedezirata. Efektive, prezentu al vi, ke nuna "mondo", t. e. burĝaro, ĉiel akcelas k senavare pagas revolucian laboron por estonta socio de Marks k Lenin, ke roma papo ĉiel helpas pensliberigan agadon de Ĝordano Bruno k Kopernik, ke naciaj agantoj k partioj pagas laboron de sennaciuloj k admiras sennacian lingvon! Ĉu ĝi ne estus vere kontraŭnatura k puninda konduto de potenculoj-nunanoj?! Ĉu ne nature ĉiu serioza novemulo al ili ŝajnos nekutime, fremde pensanta k nepraktike aganta, "originala" homo, se ne bagatelisto k utopiisto?!

7-a horzono, nordo. *M. Krjukov.*

MI VOLAS SCII . . .

Respondo al demando en n-o 303-a: Mi tute ne aprobas la publikigon de tiaj desegnoj en "S-ulo". Ili certe estas tre valoraj por ilustri la diboĉojn de la nun reganta klaso. Tamen mi ne volus ilin vidi en nia kulturcela gazeto. Per tio tre facile povus ekesti la impreso, ke "S-ulo" similas al t. n. skandalĵurnaloj, kies enhavo direktiĝas al diboĉemuloj, voluptemuloj ktp. Certe la bildo troviĝas inter la subartikolo pri la kafejo "Vaterland" (p. 454), en kiu estas priskribata la sinteno de la burĝoj. Nu, ties enhavo ne nepre necesigas tiun bildon. Eĉ se la artikolo enhavus pli intimajn priskribojn, mi prijuĝus la bildon superflua. La danĝero, ke ni estus suspektataj je ecoj k emoj, kiujn ni tute ne havas, estas tre proksima k nia movado certe ne profitus per tiaj suspektoj.

Alia afero estas, se oni vidas tiajn bildojn ekz. en la libro "La vizaĝo de la reganta klaso" de *G. Grosz.* Ĝi estas speciale verkita por ilustri la vivadon de l' hodiaŭa burĝaro k la bazo de tia libro devas esti tendenca k okulfrapa. Sed nian "S-ulo"n oni estonte indulgu je tiaj desegnoj, por ne atingi la malon de tio, kion oni per ĝi celas.

SAT-ano 135, Leipzig.

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

N-o 28. [redacted] Sub la Kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: DIM. SNEĴKO, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio)

DE L' REDAKCIO

Kelkaj K-doj proponis al ni aranĝi specialan scienc-kulturan n-on de "La Nova Epoko". Tiu n-o laŭ propono enhavu nur originalajn scienc-kulturajn artikolojn. Ni eĉ ricevis 2 artikolojn. La propono estas efektivigebla, k ni esperas, ke la red. de "LNE" k niaj kunlaborantoj helpos efektivigi ĝin. Materialon tiucelan sendu al nia paĝredaktoro, terorlandanoj al nia sekci-sekretario. — *Red.*

LA RUSAJ FILMOJ EN EKSTERLANDO

(Fino. Vidu n-on 299)

Same altarta kiel instruriĉa estas la filmverko "Ventego trans Azion" de Pudovkin. Kun ega intereso oni observas la aventurojn de juna mongolo, kiu hazarde fariĝas princido, ĉar li trovis malnovan amuleton de monaĥo. Kiel mizerulo li venis en urbeton por vendi peltojn ĉe la foiro. Li posedas tre multekostan pelton de arĝentvulpo, sed la negocistoj volas aĉeti ĝin por bagatela prezo. La agento ĵetas kun neestima gesto malmultajn monerojn sur la tablon, la stepĉasisto estu kontenta pri tio. Ĉar li *ne* konsentas, ankoraŭ unu monero flugas sur la tablon k ankoraŭ unu. Ĉio ĉi ne sufiĉas, li volas rehavi sian vulpon, li ne marĉandas. La komercisto rifuzas redoni la pelton, ekestas interbatiĝo, tranĉilo brilas, la stepano devas rifuĝi en la montaron. Tie li batalas kontraŭ kolonia armeo, estas kaptata k kondamnata je morto. Kaporalo akompanas lin ekster la urbon, sur herbejo ili ekhaltas; la soldato ne ĝojas pri sia tasko, li pli volonte kartludus kun siaj kamaradoj. Sed ordono estas ordono. Li donas cigaredon al la deliktulo, eĉ ekbruligas ĝin; ambaŭ fumas... Poste la kaporalo igas la kondamniton pluen iri, dum li mem haltas k preparas sin por pafi. La mongolo paŝas, paŝas, rerigardas — la soldato hezitas k faras mansignon pluen iri ... la kompatindulo denove iras, la pafoj krakas. Intertempe iu doktoro traserĉas la havaĵon de l' mongolo k trovas dokumenton, laŭ kiu ties posedanto devenas el princa gento. Ekscianțe tion, la kolonelo decidas, realportigi la pafiton, *espereble* nur vunditan k ne mortigitan. Soldatoj kuras por venigi lin, oni refreŝigas, operacias lin, flikas liajn vundojn, bandaĝas, flegas lin, zorgegas pri li... ĉar ja koncernas princidon, ne simplulon. Post lia resaniĝo la armestro proponas al la falsa princo kontrakton kun jenaj punktoj: 1. La princa registaro devigas sin ĉion eviti, kio povus malutili la kolonian armeon. 2. La kolonia armeo kontraŭe devigas sin subteni la princan registaron en tiuj agoj. Ĉu ni ne konas tiajn "interkonsentojn"?

La mongolo nun vivas en fremda medio, kiu ne plaĉas k ne konvenas al li, sed li devas ĉion toleri. Okaze de festeno oni prezentas al li konatulinon de tiu negocisto, kiu forrabis iam lian vulpopelton. La virino portas sur la kolo la pelton k en la mongolo vekiĝas la justa postulo reakiri ĝin. Je teruro de l' ĉeestantoj li etendas la brakojn, liaj okuloj pligrandiĝas k kolero furiozigas lin. La plua enhavo de l' filmo estas simbola, la mongolo eltiras kurban glavon k kun rigida mieno sovaĝe ĉirkaŭbategas, forpelas la fremdulojn el la lando. Ventego trans Azion! —

Sed ne nur en politikaj filmoj la rusoj montras siajn eminentajn kapablojn, ili ankaŭ kuraĝas prilabori pure artajn motivojn aŭ lumigi komplikajn animajn konfliktojn. Ekz. en filmo "La vilaĝo de la peko" la panoramo de l' pejzaĝo, la vasta spikkampo de pezaj nuboj superata, admirinde esprimas la severajn trajtojn de l' rusa tero melankolika, sopirnaskanta. Kaj la lertege elektitaj figuroj! La infanaj vizaĝoj en la primitiva karuselo! La momentoj dum la geedziĝa festo, la religiaj ceremonioj, la dancado, festenado! Kiel la kamparanoj, ekscitantaj pri la milit-eksplodo per sonorilsonado, hejmenkuras, la falĉilo sur ŝultro — kiom belega bildo! Aŭ la sentoplena scenco, kiam la junan forĝiston militservontan akompanas liaj parencoj. Unu post la alia postrestas, fine nur plu la edzino postkuras la veturileton, ĝis ankaŭ ŝi treniĝas k eĉ falas en la stratpolvon. Lastaj rigardoj sekvas la amaton, kiu malrapide malaperas post voja kurbiĝo... Vere majstre farita!

F. S., Vieno.

PRI MORTO K ŜAJNMORTO

Niaj ĵurnaloj skribas ofte pri personoj, kiuj perdis la konscion, ĉu per falo en akvon, ĉu per sveno. Poste sekvas ordinare la komuniko, ke oni sukcesis aŭ malsukcesis revivigi la viktimon. Laŭ atingita rezulto ni vidas, ĉu la viktimo estis ŝajne aŭ efektive morta. Religiulo, kiu kredas al senmorta animo, konkludas, ke la animo forlasis la korpon (aŭ ne). Por ateisto la problemo ne estas tiel simpla. Laŭ li la homa korpo estas de l' naturo tre artefarita brulmotoro. Li sekve demandas, kiam estas morta aŭ ŝajnmorta la homa korpo, k kiel diferencas la unua stato de l' alia?

Brulmotoro, el metalo konstruita, fariĝas neuzebla, kiam ĝia mekanismo estas neripareble detruita aŭ maŝinpartoj disiĝis. Se tio ankaŭ estus aplikebla al la homo, ni vidus, ke multaj viktimoj, kiujn ni kredas mortintaj, estas nur ŝajnmortaj, k transiros en morton nur, kiam la disiĝo okazas. Kiam la rimedoj por revivigo ne estis konataj, multaj homoj, hodiaŭ revivigeblaj, estis rigardataj kiel mortintaj. Laŭ mia opinio homo nur tiam mortis, kiam difekto de l' organismo aŭ disiĝo estas konstatita. En kontraŭa okazo restas solvenda la problemo, kiel ni povos denove funkciigi la vivmotoron, problemo, kiu atendas solvon de medicinistoj k scienculoj, kun kies solvo la fantomo de l' "senmorta homa animo" malaperos por ĉiuj pensantaj homoj.

Motor-maŝino rifuzinta funkcii estas, post eltrovo de l' difekto, riparebla aŭ ne. Por revivigi homon necesas atenti jenon: 1. Purigu la spirorganojn de ĉio bara; tiucele kuŝigu la viktimon, kun ventro sur breton, kun kapo malsupren je angulo 45-grada kun la planko. 2. La varmo de l' korpo, ankaŭ de koro k pulmoj, devas esti tiu de vivanta persono. Por manipulado sufiĉas varma apartamento. Oni kuŝigu la nudan korpon ioman tempon en akvobanon ĝust-temperaturan. Kiam per tiarimede artefarita spirado k oksigeno oni ne sukcesas revivigi, restas ankoraŭ rimedo: Ni povas imiti la naturon, naskiganta novan idon animalan. Ni klopodu movi la sangon en la vejnoj. Same kiel patrina koro funkcias kiel suĉ- k prem-pumpilo por cirkuligi la sangon tra la homa frukto k ĉi tiun vivigi, ni klopodu revivigi viktimon, pumpante la sangon tra la vejnoj per suĉ-prem-pumpilo.

Ankaŭ mi legis laŭ traduko el "Pravda" pri interesega eksperimento de Miĥajlovski el Taŝkent, kiu sukcesis revivigi mortigitan simion. Li elpumpis sangon, ĝis la besto mortis; ĝi restis morta 50 minutojn. Poste la sango denove estis pumpita en la kadavron k la simio ne nur reviviĝis, sed baldaŭ saltis en sia kaĝo. Tiu publikigo konfirmas mian teorion, kiu eble en nia Paĝo trovos eĥon.

Ariadno.

Menciu nepre esperanton ĉe represigo de artikoloj esp.-devenaj!

Nia poŝto.. *2800.* Aperos en sekv. paĝo. Pri "unueco de malsanoj" ni havos okazon diskuti, ĉar baldaŭ aperos artikolo tiutema. Ni esperas je via kunlaboro. — *13 607.* Ni atendas artikolon pri alia temo.

TRA ESPERANTIO

GEOGRAFIO, NEPRE NECESA EN NIA KULTURO

Iu K-do bonege proponis *normigi* en esp-o la geografi-nomojn, "kiel en naciaj lingvoj ili jam estis normitaj". Jes, ni normigu, k tiu geografia vortaro estos la unua tutmonda katalogo de homaj civitoj. Sed ĝi estos ankaŭ *la unua normigita geografi-vortaro,* ĉar en naciaj lingvoj, krom pri ĉefaj Eŭrop-civilizaj nomoj de urboj, riveroj, montoj, maroj, tia vortaro estas ankoraŭ tute senorda.

Ekzemple, en franca lingvo, rusajn, ĉinajn nomojn oni skribas jen laŭ *angla ortografio:* Shanghaï (aŭ laŭ "duonangla" ortografio . . .), jen laŭ franca: Chang-Haï, jen laŭ germana, kiam telegramo aŭ filmo estas germandevena, iafoje laŭ tute fantaziaj k eraraj ortografioj. Ĉiumatene en francaj ĵurnaloj vi povas trovi kvin aŭ dek malsamajn skribmanierojn por Ĉan-co-lin: Tchang-tso-ling, Chang-tso-ling, Tschan-tso-lin, Chan-tzo-lin, Shan-tso-lin ktp.; kion francoj prononcas Ŝan-so-len. — Por Ĥarkov vi trovos Kharkov, Karkov, Harkov, Kharkoff, Karkoff, Harkoff ktp.

Esperanto normigu! Certe, laŭ la *nuna stato,* kun iom da bona klopodo ni akceptigus *esp-an ortografion por geografi-nomoj en naciaj ĵurnaloj.* Tiel ĉiuj lernus esp-an ortografion eĉ antaŭ ol lerni esp-on.

Nur necesus enkonduki en esp-o du jam esp-e ofte skribitajn vokalojn: *ü* k *ö.* (Eĉ *ö* ne estas tre utila: esp-a *e* sufiĉas por ĝi, *sed tute ne* eŭ *kiel en Dübröj,* kiun tute bone esprimus *Dübrej,* sed tute ne *Dubreŭj,* kiel bedaŭrinde oni presigis en "S-ulo"[1]. Ĉu vi jam aŭdis, en ajna lingvo en la mondo, tiun vokalgrupon: e-ŭ-j. Mi neniam aŭdis, krom en franca "Eh oui!", sed kun akcento sur la *i.*)

Do, sufiĉus eĉ nur la *ü.* Mi ne povas kompreni, kial K-do Lanti tiom timas la *teruran* enkondukon de *ü* k *ö.* Homoj ne inventos, dekdu aliajn vokalojn. Ni estas antaŭ preciza fakto: nur mankas du vokaloj en esp-o por esprimi *praktike* laŭ tutmonda tendenco *ĉiujn geografiajn k personajn nomojn,* k nur tiajn.

Kial ne certigi, por esp-o, tiun nepre bezonan ilon: *nur tiam ni povos pretendi, ke esp-o literumas plej bone tutmondajn nomojn,* kiujn ĝis nun ĉiuj naciaj lingvoj kripligis.

La akcenton[2], kiam ĝi ne estas sur la antaŭlasta silabo, oni povas indiki per ' post la akcentata silabo: Kö'nigsberg aŭ Ke'nigsberg, Ho'hensalza (Inovrasŭav: Inowrocaw), Nü'rnberg aŭ Nürnberg, Fri'drijshafen aŭ Fri'driĥshafen.

Oni interkonsentu, sed *nepre esp-o liveru al tutmonda gazetaro sennacian ortografion por ĉiuj geografiaj k homaj nomoj.*

La ĉe SAT eldonita *"Malgranda Terbiblio"* estas tre interesa per si mem, sed mi tre bedaŭras, ke ĝi ne entenas almenaŭ, samtempe, *unu grandan sennacian karton* de la tuta mondo. En ĝi aŭ en estonta *"Sennacia Atlaso"* ni nepre bezonas bonajn prezentojn pri nia mondo.

Ĉu SAT ne povus jam kolekti *proponojn:* ĉiu geografiema K-do sendu al SAT bonan landkarton pri *sia* regiono. Precipe ĉinoj, japanoj, afrikanoj, azianoj nepre faru tion, indikante *esp-lingve prononcon* (k tradukon, kiam tradukebla) de ĉiu geografi-nomo *en sia lando.* Ĉu la azianoj nomas Filipinajn insulojn, Novan Gvineon, Novan Zelandon, Novan Kaledonion, per la samaj ridindaj nomoj kiujn donis eŭropanoj, kiuj kredis *krei* la mondon, kiam ili nur supraĵe vizitis ĝin, k nove baptis ĝin kiel nove-naskitan infanon! Kiam eblos, ni ankaŭ forigu tiun nur-eŭropan nomadon.

Oni multe parolas pri laborista kulturo, pri prolet-kulturo. Certe, inter la plej indaj celoj de tiu nova kulturo, *kompreno k sennacia organizado de l' vivanta mondo* elstaras. Anstataŭ fieri, kiel burĝido nacikultura, ĉar ni scias parkere dek versojn de Vergilio en latina lingvo post dek jaroj da lernado, aŭ dudek versojn de Homero, ni klopodu koni la mondbienon, kiun iom post iom aŭ rapide laboristaro prenas en manojn sur la tuta tero. Ni sciu, kiuj estas la klimatoj, do la kreskaĵoj, vivaĵoj, laborkapablo k plezurkapablo de l' homoj, sub ĉiu ĉielo en la mondo, por ne suferigi mallerte niajn K-dojn negrajn, flavajn, blankajn, kiam ni povos helpi ilin.

Kinematografo, radio, presarto, esperanto, permesas al ni kontaktiĝi kun ĉiuj aspektoj de surtera vivo, eĉ sen vojaĝi. Tio kreas novan homon, novan inteligenton. Volter *(Voltaire)* mem kredis pri afrikanoj aŭ azianoj stultojn de mensogantaj vojaĝuloj, kiujn hodiaŭ ne plu kredus dekjara infano, kiu vidis filmojn kiel Nanuk, Ĉang, Moana, Krasin-ŝipa vojaĝo ktp.

Mankas la tutmonda interkompreno. La filmoj ne havas en ĉiuj landoj la saman titolon: estas tre malfacile komprenigi al K-do, ke oni vidis sovetan filmon "Virinoj de Riazan", kiu nomiĝis franclingve "La vilaĝo de la peko" (tute stulta-usona titolo).

La urboj ne havas ĉie la saman nomon, la maroj ankaŭ ne. Kvazaŭ ĉiuj "internaciaj" vortoj en nacilingvoj estas kripligitaj. *"Magistrat"* estas franca vorto, kiu signifas *juĝisto.* En pola, germana, esp. lingvoj ĝi signifas *urbestraro.* Ĉiufoje, kiam alilandano citas francan aŭ anglan vorton, tre aplikatan en lia lingvo, kredante, ke li komprenigos sin en Francio aŭ en Anglio, li nur pligrandigas la malkomprenon. *"Pissoir",* skribas sur necesejoj aŭstriaj urbestraroj: en Francio tiu franca vorto estas indigniga. *"Shake-Hand"* diras anglemaj francoj por *manpremo.* La vorto ne estas angla. Ĝi estus *"handshake",* se ĝi ekzistus. Kaj tiel ĉie same.

Nur esp-o ordigos tion, kontraŭe al dandema ridinda burĝa kulturo. Por geografiaj k homaj nomoj . . . nun urĝas.

Jief.

[1] Oni do devus ankaŭ unuecigi la orelojn, ĉar por kelkaj francaj oreloj "Dubreŭj" estas pli proksima al la franca sono "Dubreuil" ol "Dubrej".

[2] Se oni enkondukas specialan akcenton por propraj nomoj, oni ne esperantigas tiujn nomojn, sed nur naciigas esp-on.

EKSTERSOVETIA K-DO!

Imitu la ekzemplon donitan! Se vi volas, ke via sovetia korespondanto restu ankaŭ estonte abonanto al "S-ulo", pagu por li la abonmonon al la kaso en Leipzig! Certe tiu K-do estos tre dankema al vi k rekompencos vin en konvena tempo, kiam la monrilatoj normaliĝis.

AMO

Estis sunplena tago en la urbeto H. Unu el niaj K-dinoj, Elso D., eliris. Ŝi rigardis la ĉielon: jes, denove la vetero estas belega, k ŝi farus grandan promenadon, pensante k ĝojante pri sia feliĉo. Antaŭe ŝi neniam povis esti ĝoja, ŝi neniam sciis, kion fari. Survoje ŝi pripensis ankoraŭ unu fojon la grandan ŝanĝon, kiun prezentis la amo en ŝia vivo.

La kuracisto malpermesis al ŝi labori en butiko aŭ en kontoro. Iam ŝi estis treege malsana k poste ŝi ĉiam restis malforta. Tiam ŝi estis hejme, k ŝi helpis sian patrinon. Sed tio estis tre teda. La komenco estis agrabla. Elso k ŝia patrino rapide finis la laboron k poste, se la vetero estis bela, ili kutime promenadis, aŭ aliel ili restis hejme, babilis aŭ legis belan libron. Sed baldaŭ tio ĉi al ili iĝis kutimo k

tedis ilin. Ŝi pensis pri siaj kamaradinoj: ili laboris, gajis, biciklis, dancis ktp. Ili ĉiuj tre amis la sporton, sed ŝi, Elso, neniam povis partopreni je tiu ĉi ĝojo. Antaŭe, kiam ŝi havis dekdu jarojn proksimume ŝi povis trankvile rigardi ilin, sed nun, pli k pli maljuniĝinte, ne plu. Dimanĉan vesperon ŝi vidas siajn amikinojn pomeni intime kun amikoj. Ŝi ne malhelpas ilin, tute ne, sed estas malgaje, ke neniu ŝajnas pensi pri ŝi. Ŝi povas ami siajn patron k patrinon, k ŝi ankaŭ faras tion, sed tio estas tute aliel ol ami amikon. Ŝi ne estas ĝoja, feliĉa, vere juna, ŝi eĉ ne povas . . .

Sed ĉu ne anoncis sin iu, kiu amas ŝin, havante tian saman senviglecon? Oni tamen sciis, ke ŝi ne povis esti alia pro sia malsano. Ho, kiom ŝi malamis ĝin, tiun malsanon, kiu forprenis la ĝojon de ŝia tuta vivo!

Sed, kvankam ŝi ofte koleriĝis, ŝi ankaŭ ofte pripensis trankvile tiun aferon. Ŝi sciis, ke estis ankoraŭ aliaj virinoj, kiuj ne estas amataj. Kion faris ili tiam? Ĉu ili tute ne amis? Jes, certe, ili amis sian laboron, tamen tian ŝi ja ne havis. Eble ŝi intencis fari ion. Ĉiun vesperon ŝi legis la gazeton, k iam ŝi legis ion pri "mondlingvo". Ŝi informiĝis k fine ŝi eksciis, ke ĝi estas tre utila k bela. Ĝi estas ankoraŭ tro malmulte konata, oni bezonas personojn, kiuj lernus la lingvon, por poste instrui mem, konigante ĝin. Ŝi pripensis k decidis lerni. Eble ŝi povos ekami tiun laboron. Ŝi vizitis klubon k lernis bone la lingvon esperanto. Post unu jaro ŝi posedis diplomon praktikan k ŝi komencis gvidi kurseton. Nun ŝi estas feliĉa, nun la lingvo esperanto estas ŝia amato, ĉar ŝi tre amas tiun laboron. Ŝi estas fiera pro tio, ke ŝi povas helpi la homaron je interalproksimiĝo ĝia. Ho, ŝi estas ege ĝoja!

Karaj geamikoj! Eble troviĝas en nia proksimo iu, kiu ankaŭ ne vere amas ion. Lernigu nian belegan lingvon al tiu persono. Ni diru ĝin al ĉiu el niaj gekonatoj, ĉar mi certigas vin, ke oni povas ami ankaŭ ion alian ol homon. Klopodu sukcesigi la alproksimiĝon de la homoj, disigitaj pro la lingvodiverso, konvinku ĉiun el via proksimo pri la utilo k belo de esperanto. Ili ankaŭ povas esti, almenaŭ fariĝi feliĉaj. Se ili lernos, ili mem certe spertos tion.

K-dino C. v. d. Meulen (16 602).

Proverbaro Esperanta

laŭ la verko "Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de *M. F. Zamenhof*, aranĝis *L. L. Zamenhof*.

Unu volumo in-8, 82-paĝa

Prezo: 1,50 mk. g.

Adm. de SAT.

PRI KORESPONDADO

Ŝajnas al mi, ke la plendo de K-do 10 041 maltrafas. Li eraras, kiam li kvazaŭ opinias, ke virinoj estas necese neseriozaj. La prefero de korespondado inter la malsamaj seksoj estas tute natura. Esp-istoj bone scias la malmulton k gravon de virinoj en Esperantio. Nur ĉirkaŭe 13% el la SAT-membraro estas virinoj. Kia estas la rimedo kontraŭ tiu ĉi malforto? Se ekzistus tiel multaj virinoj inter ni kiel viroj, ĉu ne ĉiuj havus pli bonajn ŝancojn ricevi respondojn al siaj komunikoj?

"Serĉa k facila korespondado" estas pardonebla peko. Ĉu ni ne ĉiuj kapablas esti jen serĉaj jen seriozaj? Kial kaŝi sin malantaŭ nesentataj esprimoj? Esperanto liberigas pensojn k sentojn. Se gekorespondantoj ĝojas pri nove trovita libero, ĉu ni rajtas ilin kondamni?

Korespondado kun la t. n. neŭtraluloj estas peko, kiu facile fariĝus virto. Multaj el ili nur estas neŭtraluloj, aŭ ĉar ili neniam aŭdis pri SAT k niaj laboristaj rondoj, aŭ ĉar esti alie estus multloke maloportuna. Ĉi lastajn ni, pli favore lokitaj, povus helpi multe, se ni volus, per alsendo de niaj ĵurnaloj, libroj ktp. La aliajn, anstataŭ moki, ni devus varbi. Almenaŭ pri unu el la multaj SAT-sekcioj interesiĝus ĉiu homo, kiu iam posedis sufiĉe da energio por eklerni nian lingvon.

Mia konsilo estas korespondi kun ili, precipe kun la virinoj, k tiel interesi ilin je nia Asocio, ĵurnaloj, literaturo ktp. Nia SAT estus pli potenca, se la nuna plimulto estus tiu de virinoj. "La mano, kiu lulas la lulilon, regadas la mondon." 16285, Usono.

KONTROLU VIAN BIBLIOTEKON

Verŝajne la plejmulto el la lokaj lab. esp-istaj grupoj, posedas propran bibliotekon je dispono de siaj membroj, por ke la komencintoj per libroj lernadu k ekzercu k la progresantoj perfektiĝu en la lingva uzado. Sed ĉu la stato de tiuj bibliotekoj ĉiel estas kontentiga? Laŭsperte kelkloke oni preferas la aĉeton de romanoj k rakontoj, aliloke superregas la serioza, aŭ politika literaturo. Tio dependas ofte de la persona gusto de l' gebibliotekistoj. Tamen ni kiel *laboristaj* esp-istoj ne malhavu fundamentajn eldonaĵojn pri nia movado, ekz. "La laborista esperantismo" de K-do Lanti, aŭ similajn broŝurojn. Tiajn libretojn *nepre* devas havi *ĉiu* lab. esp-ista biblioteko. Ne diru, ke la grupanoj ne emas legi tiujn faklibrojn, sed deziras pli facile legeblajn verkitaĵojn. Eĉ se neniu postulus ilin, ni ne ignoru nian fakliteraturon. Kontraŭe ni povas zorgi, ke la faklibroj estas legataj per rekomendo ilia al la membraro. Sed unue oni devas havi ilin, la intereso poste sekvos per si mem. Do, Gek-doj, kompletigu vian grupan bibliotekon!

F. S. (16 362).

TRA LA MOVADO

KRONIKO

AŬSTRIO. Vieno. La 22. 5. okazis bonsukcesa kursfinfesto ĉe la XVI-a grupo kun 230 p. La 3. 7. parolis la verkisto J. Baghi antaŭ ĉ. 150 Gek-doj pri sia nova romano. — *FINNLANDO.* Lab. Esp. Societo en Tampere "Antaŭen" aranĝis je 8. 6. publikan feston kun esp. ekspozicio. Paroladis K-do Kostiainen k s-o Setälä pri esp-o. SAT-libroj estis vendataj. La finna ŝtata lekcia komitato asignis helpon de 200 fmk. por esp. lernado ĉe "Antaŭen". La monhelpon peris Lab. Kleriga Asocio, k por la sumo la asocio mendis lernolibrojn. En aŭtuno okazos novaj kursoj. (5095.) — *GERMANIO. Chemnitz.* Elektiĝis novaj LEA-grupestro (K-do Bennewitz, 2378) k SAT-peranto (Klinger, 2401). Oni decidis koresp. kolektive kun alilandaj lab. esp. grupoj. Fine de junio la LEA-distrikto aranĝis semajnfinan kurson kun priesp. paroladoj, ekzamenoj, kursgvidado k efika propagando. Partopr. 25 p. Distriktkonferenco okazos 10. aŭg. en Aŭerbaĥ i. V. (sporthejmo). Tagordo gravega. — *SOVETIO. Leningrad.* En Domo de Medicinlaborantoj okazis 4-monata kurso kun 9 membroj. Tiea rondeto el medicinistoj k pedagogoj havas 16 anojn. Dum somero estas preparata aktivularo k gvidantoj por la aŭtun-vintra periodo. Eksterl. medicinistoj k pedagogoj skribu pere de K-dino A. Petrajickaja, Injernernaja 9, Domo de Medicinlaboranto, Leningr. — *Ŝaĥti* (Nordkaŭkaza reg.). Post transloĝiĝo de l' respondeca sekr. K-do Savenko al Ŝaĥti tie komenciĝis vigla laboro. Oni disvastigis literaturon (lernilojn) por pli ol 300 rbl. En 11 lokoj de l' distrikto estas nun firmaj bazoj por laboro. Plej gravaj Sulin, Liĥaja, Zverevo k minejoj ĉirkaŭ Ŝaĥti, kie laboras fervoraj K-doj (en Sulin Melnikov, estro de lab. universitato). 24./25. VI. okazis unua distr. konferenco kun kelkdeko da delegitoj. K-do Levenzon raportis pri SAT k ĝiaj taskoj. Oni esperas povi efektivigi nedevigan enkondukon de esp. en ĉiuj distriktaj lernejoj. — *Kupjansk* (Ukrainio). Dum junio K-do Lingel lekciis 18-foje en lokaj kluboj, institucioj k lernejoj. Organiziĝis rondeto (25 p.) en Distrikta Plenumkomitato kune kun poŝtoficejo. Kurso 10-taga sukcese finiĝis. (5087.) — *Brjansk.* Dum aprilo finiĝis kursoj aranĝitaj de K-do Lingel. — *Sudak* (Krimeo). Dum majo K-do Lingel dufoje paroladis pri esp-o en loka klubo k organizis kurson el medicinistoj (25 p.).

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Raymond Schwartz, Anni k Montmarte. Romano. Ilustraĵoj de R. Laval. Esperantista Centra Librejo, 51, rue de Clichy, *Paris,* 126 pĝ. Form. 12,5×16 cm. Prezo: 12 fr. fr.

En la amuza k sprita maniero, kiu karakterizas la aŭtoron, li prezentas al ni la vivon en Monmartr *(Montmartre),* tiu Pariza kvartalo fama pro sia noktvivado. Sian deziron konigi al ni la multkoloran, de ekscesoj saturitan atmosferon de tiu loko, li kontentigas sub la formo de per si mem sufiĉe senartifika k banala "romano": per iu hazardo naiva, bigote edukita virgino el plej malprogresema parto de Germanio (Orienta Prusio) trafas la monduman vivon de Monmartr kun ĉiuj ĝiaj delogoj, diboĉadoj k malvirtoj. Ŝi nekonscie facile "paŝas sur la glita vojo de l' peko", falas en manojn de kokain-kontrabandistoj k publikulinoj k fine elsaviĝas nur per la helpo de "bonkora maljunulo", kiu en la servo de l' sekretpolico ŝtelobservas la aktorojn de l' noktvivaj dramoj. Ĉirkaŭ tiu temo plektiĝas tre vivplena priskribo de l' medio; la usonaj bonvivuloj, la kaŝvendistoj, la virinmerkato estas lerte pentritaj. Lia lingvo estas bona, fleksebla, tamen ne sufiĉe liberiĝas el la franca esprimmaniero; ekz. la vorto "senblage", se uzata, meritus almenaŭ piednotan klarigon, precipe ĉar "blago" ankoraŭ ne eniris la ordinaran lingvouzon. Plurajn aliajn neologismojn permesas al si Ŝvarc: *taksio* (p. 31,70) = luaŭtomobilo, *ŝrumpi* (p. 100) = malŝveli, sekiĝi, *pudoro* (p. 102) = hontosento, *pimpanta* (p. 35) = ? Certe la libro estas pliriĉigo de l' originala esp. literaturo.
N. B.

Tricent Jaroj da Historio Bostona de *Norman W. Frost.* Havebla ĉe The Esperanto Association of North America, *Fort LEE,* N. J., Usono. 24 pĝ. Form. 11×15. Prezo nemontrita.

Okaze de tricentjara jubileo de l' usona urbego Boston estas priskribita ĝia historio en tiu ĉi broŝuro, la ekkoloniigo de Novanglio, la militoj anglo-francaj ktp. Bedaŭrinde la esp. stilo estas terure malbona, k ni renkontis eĉ tute nekompreneblajn frazojn, kiel: "Sudokcidenta Anglujo entreprenadis maron" (p. 5). Ankaŭ tre malbela k ĝena estas la konstanta uzo de l' sufikso *-ad.*
N. B.

Esperanto por persoj. Verkita de *Bahmen Ŝidani.* Dua eldono. 136+70+XVI pĝ. Form. 11×17. Prezo: 5 sv. frk. Havebla pere de UEA, 1, rue Tour de l' Ile, *Genève.* Svisio.

Gramatiko k vortaro por persoj, kun multaj ekzerco-tekstoj, sed bedaŭrinde ankaŭ multaj preseraroj en la esp. teksto. Sur la kovrilo ni trovas ankaŭ la adreson de SAT kun mallonga klarigo perslingva.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

The Workers Monthly, Wimbledon, julio, El lando de senlab. k krizo (288), *Kansan Lehti,* Tampere, 21. 6., Tago el mondmilito.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Kansan Lehti, Tampere, 19. 4., 2. 5., 7. 6., 10./12. 6. (trad. k verkis 5095), *Signalen,* Stokh., 26. 6., *Vanguarda Operaria,* Porto, 15. 6.,*D. Volkslehrer,* Langensalza, 22. 6., *El Socialista,* Madrid, 25. 6., *Daily Worker,* London, 4. 7., *Münchener Post,* 30. 6., *Le Socialiste,* Villejuif, junio/jul., *Rebellion,* Madrid, 14. 6., 28. 6. (speciala rubriko en esp. de la Lab. Esp. Grupo Madrida), *The Labour Woman,* London, julio (rubr.), *Svenske Järnvägstidningen,* Stokholmo, 1. 7. (rubr.).

Pri SAT-Kongreso raportis:

Het Volk, Amsterd., 26. 6.

Peresper. materialon enpresis:

Neue Zeitg., München, 23. 6., *Krasni Altaj,* Barnaul, 11. 6.

KORESPONDADO

FRANCIO

K-do Coll (7998) sciigas al siaj gekorespondantoj, ke dum periodo de 1. 8. ĝis 20. 9. li respondos al neniu, *pro foresto de sia hejmo.*

SOVETIO

K-dino Valentino Buŝmarina, *Tver,* Ptaŝkino boloto, n-o 45, kor. kĉl, pri ĉ. temoj PK.

INTERNACIA AFIŜ-EKSPOZICIO

En aŭtuno de l' kuranta jaro, la Lab. Esp.-Grupo Leipzig aranĝos grandan ekspozicion kun la titolo:

"LA POLITIKA AFIŜO EN LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO".

Por sukcesigi tiun ĉi entreprenon, ni petas ĉiujn SAT-aktivulojn, sendi al ni la plej belajn k efikajn afiŝojn eldonitajn de lab. partioj, kooperativoj, profunuiĝoj (sindikatoj), kultur- k sportasocioj. Ĉiuj tendencoj estu reprezentataj! Teksto-tradukoj k klarigoj pri la ideo de l' afiŝoj akompanu la sendaĵojn, kiuj alvenu plej malfrue je 1. 10. 30.

Laŭdezire ni repagos la elspezojn k resendos la materialon. Krome ni rekompencos la klopodojn per transsendo de kongresmemoraĵoj de nia Naŭa.

Valorajn sendojn ni ankaŭ rekompencos per libroj aŭ monaj repagoj, laŭ la financa profito de la ekspozicio.

Ĉiujn sendaĵojn direktu al K-do P. Grünberg, *Leipzig S 3,* Klemmstr. 6/ptr.

NEPRE LEGU!

La 30-an de aŭgusto okazigos la Laborista Esperanto-Grupo Seifhennersdorf gravegan propagand-ekspozicion kun lumbild-parolado. Ĉiuj grupoj, kolektivoj k K-doj estas petataj helpi al ni, tuj sendante esp-aĵojn, leterojn, fotojn, PK. La K-doj, kiuj ricevis la leteron datitan de 12-an de febr. estas petataj tuj respondi la demandojn. Al ĉiuj sendontoj ni respondas senprokraste. — Adr.: Arthur Guhr, *Seifhennersdorf* n-o 190 (Germanio).

La Noujorka kompartia organo en la juda lingvo, la ĉiutaga gazeto "Frajhajt" ("Libereco") petas esp. laboristajn korespondantojn de ĉiuj landoj skribi al ĝi pri jenaj temoj: labor- k vivkondiĉoj de laboristaro, agado de revoluciaj k reformemaj profunuiĝoj, manifestacioj, strikoj, blanka teroro ktp. Ŝatas ricevi gazetojn, flugfoliojn k afiŝojn. Numero kun presitaj artikoloj sendotaj al la aŭtoroj. — Skribu laŭ adr.: "Freiheit", 30, Union Square, *New York City,* aŭ laŭ adr. de l' tradukanto: M. Oholiav, 471, Chester St., *Brooklyn, N. Y.*

ENHAVO

	pago
El Londono	507—08
La okazintaĵoj en Egiptio	508
Plio pri ĵurnalismo en Britio . .	509
Industrio kaj milito	509
Pri la "Letero el Italio"	509
La klasbatalo tra la mondo . . .	509—10
Mastroj deziras socialismon . . .	510
Pro Dostojevski	510
Mi volas scii	510
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo .	511
Tra Esperantio	512—14

Abonta̲rifo al Sennaciulo: (La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.) **Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgoj 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉeĥoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, kr. 7 (8); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.** MONON ONI SENDU: rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio),** poŝtĉek-konto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929 — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — La sovetianoj al CK de SEU, poŝtkesto n-o 630, Moskvo. En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero.**

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)